**LA KONGRESURBO**

Ĉu necesas priskribi la allogon de tiu marurbo? Nenie la strando kaj la digo estas tiel belaj kaj larĝaj. En la somero la urbo estas turist-, kaj do vivplena! Aparta ĝojo estas vidi la sunsubiron en la maro, de sur la digo. Sur la sama loko monumento, honore al la serĝentoj Lippens kaj De Bruyne, memorigas pri la koloniigo de la tiama Kongolando.


# Krimo kun laŭdoj



Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton

"Jaĥto veturas for...", nova krimromano de Deck Dorval, sukcesis en kelkaj monatoj rikolti laŭdajn recenzojn ĉie en la Esperanto-literaturo:

- Kia krimromano! Rapidpafa rakontado per vigla lingvaĵo (Esperanto)
- Bela riĉigo de nia propra literaturo romana (Dialogo)
- Agatha Christie revenis sub nova pseŭdonimo! (Franca Esperantisto)

**Eldonis:** Flandra Esperanto-Ligo, 1984, 192p. Mendu ĉe via libroservo aŭ rekte de la eldonejo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Prezo 340 BEF (Por Belgio 360 BEF, inkl. 6% AVI)


| | |
|---|---|
| | |
| ........../.......... | ................/...... |
| | |
| | |

# ALIĜILO

**Kongresa sekretariejo:** Tria Flandra Esperanto-Kongreso, S-ro R. Iserentant, Sint-Pieterskerklaan 59, B-8000 Brugge (Belgio).

**Por pagoj:**

- nur en Belgio — Pagu la sumon en belgaj frankoj al la bankkonto 470-0267681-82, de Tria Flandra Esperanto-Kongreso, Brugge. Klare menciu: "Kotizo Kongreso 1986" kaj vian nomon.
- nur el eksterlando — Pagu la sumon per poŝtĉekkonto al la sekvanta konto: 000-0428551-05 de Fernand Roose, Sinte-Claradreef 59, B-8000 Brugge, aŭ per internacia poŝtmandato al la supra adreso (en via poŝtoficejo oni kalkulos la sumon en belgaj frankoj).

**Grava rimarko:** Sendu la aliĝilojn nur al la kongresa sekretariejo!

*Mi aliĝas al la Esperanto-kongreso 1986 en Blankenberge laŭ ĉi-subaj kondiĉoj kaj prezoj:*

(*) forstreku nevalidan mencion.

Viro/Virino*

Kompleta nomo (preslitere): ..........................................

Familia nomo (preslitere) ..........................................

Kompleta poŝta adreso, nacilingve kaj per latinaj literoj, kun poŝtkodo ĝuste lokita:

..........................................

..........................................

..........................................

Mi loĝos en dupersona ĉambro kun sinjoro/sinjorino: ..........................................

## KONGRESKOTIZOJ

○ Aliĝkotizo: 500 BF* ........................................................ = ....................
(tiu ĉi kotizo inkluzivas la ekskurson
al la haveno de Zeebrugge)

*por la restado vi havas jenajn eblecojn:*
○ Tuta kongreso: 2.500 BF ................................................ = ....................
(tri manĝoj tage plus tranoktado)

○ Sabata partopreno: 1.250 BF ........................................ = ....................
(tranoktado de vendredo al sabato kaj tri manĝoj)

○ Dimanĉa partopreno: 1.400 BF ...................................... = ....................
(tranoktado de sabato al dimanĉo kaj tri manĝoj —
la dimanĉa tagmanĝo estos iom bankedo)

○ Kampadejo: 100 BF ...................................................... = ....................

*La kvar supre menciitaj prezoj de restado **ne** inkluzivas la aliĝkotizon!*

○ Mi rajtas rabaton de 10 % ekde la dua persono
el mia familio: ................................................................ = – ...............

○ Mia kotizo tiel estas kaj mi pagos sume: ...................... = ....................

## KONDIĈOJ

– La aliĝkotizoj rajtigas al partopreno en ĉiuj kongresaj aranĝoj.
– Limdato por rezervigo de ĉambroj: la 1a de aŭgusto.
– Por la tranoktado nepre indiku sur la aliĝilo kun kiu alia persono vi tranoktos en dupersona ĉambro. — Estos ekstreme malfacile akiri unupersonan ĉambron. Ankaŭ pro tio estas ege dezirinde aliĝi kiel eble plej frue al la kongreso.
– La aliĝilo nepre sendu nur al la kongresa sekretariejo.
– Pagante por alia persono, indiku ĉiam klare la celon de la pago kaj menciu detale la nomon kaj adreson de tiu persono.

* Nur 300BF, se vi estas malpli ol 26jaraĝa.

# TRIA FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO 1986 - BLANKENBERGE

**29, 30 kaj 31 aŭgusto 1986**

## LA KONGRESO

La grupo el Bruĝo, "Paco kaj Justeco", organizas ĝin. Tiu kongreso interesos ne nur la Flandrojn. Vendredon dum la renkontiĝa vespero ni montros filmon pri la plivastigado de la haveno Zeebrugge. Sabaton ni vizitos tiun havenon kaj ricevos ĉiujn klarigojn.
Ankaŭ sabato, vespere, estos ebleco viziti la urbon Bruĝo. Sendube multaj inter vi scias, ke tiu mezepoka urbo havas mirindan historian kadron. Nu, tiun kadron ni vidos lumigita. Tio estas vere fea spektaklo.
Okazos du ĝeneralaj kunvenoj. En ia 'akademia' kunsido ni pritraktos la temon *«Esperanto en la aktualeco»*. Tie ni aŭdos la opinion de spertaj esperantistoj pri la nuna stato de niaj lingvo kaj movado. Ideo-interŝanĝo sekvos. Okazos ankaŭ ĝenerala kunveno de Flandra Esperanto-Ligo dum kiu ni ekscios estintajn kaj projektitajn aktivecojn de la Liga estraro kaj de la grupoj. Spertoj kaj ideoj de eksterlandanoj estos certe instruaj kaj do bonvenaj.
Dimanĉon, tagmeze, iom pli ampleksa manĝado (bankedeto?) finos la kongreson. Tamen ne ankoraŭ la fino de via agrabla restado. Efektive, posttagmeze vi povos admiri en la urbo mem la "florsekvantaron" (korson), kiu estas fama en tuta okcidenta Eŭropo.

## LA KONGRESEJO

Ĉiuj kunvenoj, loĝado, manĝoj, ktp. okazos en la sama domo: la "Duinse Polders" (Dunaj Polderoj). Antaŭ jaroj okazis tie kongreso de Esperantaj fervojistoj. Antaŭ la enirejo haltas tramo kiu kondukas vin al la centro de la urbo kaj al la stacidomo.